



## PILO-PRESS

Internacia  
Informservo

Aktuala informado  
ankaŭ en Esperanto

**Eldonanto/Herausgeber:**

per PILO-PRESS

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 1

Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

Subtenu tiun-ĉi

aktualan informilon!

N-ro 13/77 - 28 mar 1977  
Aperas ĉiusemajne

Hinduĵo - nekonata lando

Maratona prelego de s-ino M. Haudebine

Nürnberg (pp) - Laŭplane komenciĝis la prelegvojaĝo de s-ino Madeleine Haudebine ĉe Esperantogrupoj en F R Germanujo sabate, la 19-an de marto en Oberkirch. Jam la postan tagon ŝi prelegis en Augsburg kaj la alian tagon, lunde la 21-an de marto en Würzburg.

Certe estis hazardo, ke la prelego komenciĝis en tiuj tagoj, kiam en Hinduĵo okazis novelektoj. Tamen per tiu fakto la prelego fariĝis pli aktuala, kvankam s-ino Haudebine ne parolis pri la nunaj politikaj cirkonstancoj kaj ne pri la sekvoj de la eksterordinara stato proklamita de Indira Gandhi. S-ino Haudebine prelegis pri siaj propraj spertoj dum multjara vivado en tiu granda lando, pri la historio, kulturo, civilizacio, la religioj, la kasto kaj la pli ol 800 lingvoj kaj dialektoj de la hinda subkontinento.

Oni vere devas admiri la viglecon kaj profundan scion de la prelegantino. Ŝia prelego, kiun ŝi ilustras per diapozitivaj bildoj, religiaj kaj folkloraj objektoj ktp., daŭras inter 3 ĝis 4 horoj. Aldone necesas unu horo por preparo. Fakte unu vespero ne sufiĉas; oni povus plenigi tutan tagon, se oni volus ankoraŭ diskuti kun ŝi pri unuopaj aferoj de la temo.

Ĉi-sekve ni publikigas mallongajn raportojn pri la prelegoj en Oberkirch, Augsburg kaj Würzburg:

Oberkirch. (hh) - La konata franca esperantistino Madeleine Haudebine en Germanio nuntempe faras prelegvojaĝon, kies unua etapo estis Oberkirch. Tie dum sabato, la 19-an de marto 1977, antaŭ 24 gesamideanoj ŝi demonstris sian abundan scion pri Hinduĵo.

Dum trihora prezentado ŝi rakontis pri hindaj homoj, kulturo, kastosistemo ktp., montris diapozitivajn pri altrangaj konstruaĵoj kaj ekspoziciis aron da originalaj objektoj el Hinduĵo.

Dankis per forta aplaŭdo la aŭskultantoj, kiuj venis krom el Oberkirch ankaŭ el Karlsruhe, Freudenstadt kaj Strasburgo, por tiu informo, instrua kaj interesa prelego.

Augsburg. (pp) - Pro teknikaj kaŭzoj la antaŭvidita prelego en Nürnberg okazis en Augsburg, en la nova Esperanto-centro. Ĉeestis ĉ. 25 personoj, inter ili 6 el Nürnberg. La prelego en Augsburg komenciĝis je la 18-a horo kaj finiĝis je la 23-a horo. Sed s-ino Haudebine tute ne jam estis elĉerpita, ŝi estus povinta daŭrigi ankoraŭ horojn. Ŝiaj vortoj elŝpruciĝis en bonega kaj klare komprenbla Esperanto kiel akvofluo el neelĉerpebla fonto garnita per trafaj gestoj kaj sonoj. Estis vera travivaĵo, ankaŭ por tiu kiu ne komprenis ĉiujn vortojn!

Würzburg (pp) - Laŭ telefona informo ankaŭ la prelego en Würzburg estis plena sukceso. Ĉeestis 25 personoj. Marde, la 22-an de marto, s-ino Haudebine daŭrigis sian vojaĝon al Hamburgo, kie ŝi prelegos jaŭde, la 24-an de marto, je la 19-a horo en Esperanto-klubejo Hamburg-Langenfelde, Vehrenkampstr. 15-17, je 19-ahoro.

S-ino Haudebine eklernis Esperanton en la jaro 1931 kaj estis jam 1932 helpantino al la sekretario de la Universala Kongreso en Parizo 1932.

# SĂ ÎNVĂȚĂM...

## I.

În urma numeroaselor cereri primite din partea cititorilor revistei și având în vedere faptul că ei nu au timp să participe la cursurile de învățare a limbii esperanto, publicăm mai jos unele reguli gramaticale de bază.

După cum spuneam într-un articol precedent, limba esperanto se bazează pe un număr redus de rădăcini de cuvinte luate din izvorul limbilor romanice, germanice și slave, pe o gramatică foarte simplă, cu 38 sufixe și prefixe. De aceea se învăța ușor, iar cei ce vor studia temeinic vor putea corespunzător și lega priceperea cu esperantistii din întreaga lume. În felul acesta vor contribui la întărirea relațiilor de pace și prietenie, a schimburilor intelectuale, culturale, filatelice etc., cu oameni din oricare colț al lumii și totodată vor putea face cunoscută peste hotare cultura, știința și arta românească, precum și realizările și frumusețea României socialiste multilateral dezvoltate.

Limba esperanto este o limbă absolut fonetică; cuvintele se citește așa cum se scriu. Accentul se pune întotdeauna pe penultima silabă. Alfabetul se compune din 28 de litere și anume: 5 vocale, două semivocale și 21 de consoane. Vocalele sînt a, e, i, o, u. Cînd se întîlnesc două vocale, ele se pronunță separat. Exemplu: iu (cineva) se pronunță i-u (adică un cuvînt format din două silabe, dintre care i, fiind penultima silabă, este accentuat); io (ceva) se pronunță i-o; ie (undevea); ia (cîmva). Semivocalele sînt j = i moale și ŭ = u scurt, care formează diftong cu vocala pe lângă care stă, singure neputînd forma o silabă. Ex: jaro (an) se pronunță ia-ro; aŭ (sau) este o singură silabă. Consoanele se citește ca și în românește, în afară de: c=:t; paco (pace) se citește pa-to; ĉ=:ce sau ci; felĉo (fericire) se citește fe-li-ĉeo; ĉielo (cer) se citește ci-e-lo; ĥ=:ch gutural; ĥoro (cor) se citește cho-ro, față de h natural: ĥoro (oră), care se citește ho-ro; ĝ=:ge sau gi; paĝo (pagină) se citește pa-gio, față de pago (plată), care se citește pa-go, sau genitiv (genitiv), care se pronunță ghe-ni-ti-vo; ĵ=:j; ĵaŭdo (joi) se citește jau-do; ŝ=:ŝ; ŝtato (stat) se pronunță ŝta-to, față de stato (stare), care se citește sta-to. Deci alfabetul limbii esperanto este: a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h,

ĥ, ĵ, ĵ, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z. Celelalte litere cum ar fi ă, â, î, ș, q, w, x, y se întrebuintează numai în transcrierea unui nume sau a unei localități în original (denumirea din țara respectivă).

Toate substantivele au terminația „o”, excepție făcînd prenumele feminine care se termină în „a”: homo (om), mano (mîină), kapo (cap), varmo (căldură), Maria; toate adjectivele au terminația „a”: bela (frumos, frumoasă), bona (bun, bună), alta (înalt, înaltă), felĉa (fericit, fericită), varma (cald, caldă); toate adverbele au terminația „e”: home (omenesec), bone (bine), felĉe (în mod fericit). Articolul hotărît este „la”, care rămîne neschimbat indiferent de sex, caz, număr: la homo (omul), la viro (bărbatul), la virino (femeia), la homoj (oamenii), la libro (cartea), la libroj (cărțile). Articolul nehotărît (în limba română „un”, „o”) nu există. Prenumele personale sînt: mi (eu), vi (tu, dumneata, dumneavoastră), li (ei), ŝi (ea), ĝi (despre obiecte, animale sau ființe la care nu se precizează sexul), ni (noi), vi (voi, dumneavoastră), ili (ei, ele), oni (cineva, se). Toate verbele au la infinitiv terminația „i”: esti (a fi), havi (a avea), fari (a face), iri (a merge), labori (a lucra), legi (a citi), skribi (a scrie), lerni (a învăța); verbul rămîne neschimbat, indiferent de persoană sau număr. Prezentul se formează schimbînd terminația infinitivului „i” cu terminația „as”, rădăcina cuvîntului rămînd aceeași: labori (a lucra), mi laboras (eu lucrez), ni laboras (noi lucrăm), ili laboras (ei sau ele lucrează); trecutul are terminația „is”: ŝi laboris (ea a lucrat), mi legis (eu am citit) se pronunță le-ĝis, li skribis (el a scris), ni promenis (noi ne-am plimbat); viitorul se termină în „os”: li iros (el va merge), ni manĝos (noi vom mânca). În limba esperanto mai sînt două moduri și anume: conditionalul, care are terminația „us”: mi laborus (eu aș lucra), ŝi manĝus (ea ar mânca); și imperativul, care are terminația „u”: laboru (lucrează!), manĝu (mînceacă!).

**Exerciții de citire:** sceno (scenă) se citește ste-no, citrono (lămîie) — ti-tro-no, iano (cîndva) — i-am, fată de jam (deja) — i-jo (o singură silabă), longa (lung) — lon-ga, mallonga (scurt) — mal-lon-ga, internacia (international) — in-ter-na-ti-a, heroo (erou) — he-ro-o.

### ADRIAN CRENGĂNIS



Clubul esperanto de pe lângă Casa municipală de cultură Cluj-Napoca, Piața Libertății nr. 24, anunță pe cei interesați, că începînd cu 4 ianuarie 1977, în fiecare primă zi de marți din lună are loc, la sediul, un mic spectacol bilingv (român-esperanto).

En Cluj-Napoca/Kolozsvár, kie unuan fojon en la historio de la Internacia Lingvo, 1897, profesoro Gabrielo Bálint organizis la unuan kurson en kadro de universitato, ankaŭ nun estas vigla Esperanto-agado.

En la Kulturpallaco jam de jaroj funkcias kursoj. La aktoraro de la ŝtata Pupteatro sukcese uzas en siaj spektakloj ankaŭ la Internacian Lingvon. Nun, dezirante helpi tiujn kiuj ne havas eblecon partopreni al la Esperanto-kursoj, la loka universitata gazeto NAPOCA UNIVERSITARĂ

komencis aperigi la rubrikon **"să învățăm..."** (Ni lernu...), de s-ro Adrian Crengănis. Apude ni publikigas eltranĉaĵon el la gazeto kun la Esperanto-kurso, kiun afable disponigis al ni s-ro Jenő Zágoni, SF Gheorghe.

La gazeton ni ricevis kelkajn tagojn antaŭ la granda tertremo en Rumanio.

### Anonceto

S-ro Zágoni Jenő, R-4000 SF.Gheorghe, str. Presei, 2.Bl.15, etaj 10, ap.44, Jud.Covasna, Rumanio, sciigas ĉiujn siajn Esperanto-amikojn, ke okaze de la tertremo, perdiĝis ankaŭ lia adresaro. Liaj korespondamikoj estas petataj unue skribi al li. Esperanto-gazetoj estas petataj represi tiun informon!

\*\*\*\*\*

PILO-PRESS, ĉiusemajna informservo, jara abono 30,-- GM. Pagebla al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg, P&k. Nürnberg 81956-851

### Fervojistaj terminaristoj kunsidus

Amsterdamo (pp) - En Amsterdamo je la semajfino 19-a - 20-a de marto kunvenis 9 fervojistaj terminaristoj el tri landoj (B, D, NL) por pri-diskuti dubajn terminojn kaj pripensi eblecojn kiel plirapidigi kaj pli-simpligi la kompiladon de la ampleksega fervojfaka leksikono, pri kiu la Terminara Komisiono de IFEF jam laboradas dum pli ol 20 jaroj.

La instigo al tiu interkongresa kunveno, la dua post tiu en Budapeŝto dum novembro 1976, venis de Dieter Hartig el Bremeno, F R Germanio, kaj Wim van Leeuwen disponigis por la laboroj sian oficejon en la ĉef-stacidomo de Amsterdam, kie ne mankis regalo per kafo kaj eĉ kuko, baki-ta de s-ino de Jong.

La edzinoj de la terminaristoj komune ekskursis tra la urbo kaj sabaton vespere oni komune sin distris en folklora restoracio apud ventmuelejo.

- Ritt -

### Esperanto en Praktiko

#### Foiraj afiŝoj

Milano (pp) - Ankaŭ ĉi-jare la Foiro de Milano varbas per Esperanto. La Foiro eldonis du diversajn afiŝojn kun Esperanto-teksto: "Foiro de Milano 14-an - 23-an de aprilo 1977 Internacia Centro de la Interŝanĝoj" kaj "Milano 'La Granda Foiro' Generala Specimenfoiro 14 - 23 Aprilo 1977 - 57 fakaj ekpozicioj Majo 1976 - Aprilo 1977".

#### Novaj Esperanto-Prospektoj pri Finnlando

Turku (pp/apett) - Lastatempe aperis en Finnlando kelkaj tre belaj Esperanto-prospektoj, kiujn oni povas tre bone utiligi kadre de la kluba agado aĉ en la Esperanto-kursoj, kiel plaĉan kompletigan legaĵon. La prospektojn oni mendu ĉe la jenaj adresoj:

- |  |  |
|--|--|
| 1) Kaupungin matkailutoimisto<br>Käsityöläiskatu 4<br>SF-20100 TURKU 10, Finnlando   | 2) Kaupungin matkailu-ja<br>kongressitoimisto<br>Aleksis Kiven katu 14<br>SF-33210 Tampere 21, Finnlando |
| 3) Kaupungin matkailutoimisto<br>Vapaudenkatu 38<br>SF-40100 Jyväskylä 10, Finnlando | 4) Kaupungin matkailutoimisto<br>PL 113 /Valtakatu 23/<br>SF-53101 Lappeenranta 10, Finnl.               |
| 5) Kaupungin matkailutoimisto<br>Haapaniemenkatu 17<br>SF-70100 Kuopio 10, Finnlando |  |

La prospekto de Turku, kiu jam aperis la kvaran fojon, enhavas ankaŭ informon pri eblo ricevi Esperanto-gvidanton dum la vizitado de la urbo. Esperanto-revuoj estas petataj informi pri la prospektoj sian leganta-ron.

#### Gemelaj kontaktoj serĉataj

Rennes (pp) - La Esperanto-Klubo de la franca urbo Rennes serĉas kon-takton kun esperantistoj en Erlangen, kiu urbo estas ĝemeliĝinta kun Rennes. La Rena Esperanto-Klubo jam havas ĝemelajn kontaktojn kun Exeter en Anglio kaj Brno en Ĉeĥoslovakio. Interesuloj skribu al Club esperantiste rennais, s-ro D.S. Clopeau, 4, résidence J.B. de la Salle, F-35000 Rennes, Francio.

#### Farso en Munkeno

Munkeno (pp) - Okaze de la klubkunveno, lunde, la 28-an de marto, je la 19,00 horo, estos prezentita germanlingva teatraĵo de Reinhold Maier, nome la farso "Dreieck" (Triangulo). Ludos Hansjochen Vogt, Maria Bless kaj Reinhold Maier. Gastoj bonvenaj. La kunveno estas rekte ĉe la ĉefstacidomo: Ausstellungsraum Holzkirchner Bahnhof, Enirejo Bayerstr. 14.

## Informa servo de PEA sciigas

Varsovio (pp) - Okaze de la pasanta ĉi-jare datreveno de la korespondaj kursoj, la 30-a datreveno, Pola Esperanto-Asocio organizos baldaŭ tutpollandan kvizon, kies celo estas diskonigi Esperanton kaj la korespondajn kursojn de Esperanto. En simila kvizo okaze de la 25-a datreveno de la korespondaj kursoj partoprenis 2 856 personoj kaj miloj da homoj estis informitaj ĉeokaze per gazet-artikoloj kaj informoj. Nunjare oni invitos al la kunlaboro pri la kvizo 67 jurnalojn kaj semajnajn gazetojn kun la suma eldonkvanto de 19,5 milionoj da ekzempleroj.

Rzeszów. (pp) - La konata pola pupteatro "Kacperek" el Rzeszów, sudorienta Pollando, preparas sin al la partopreno en la nunjara pupteatra festivalo en Zagrebo, kie ĝi prezentos la teatraĵon de Joachim Knauth "Der Prinz von Portugal" en la Esperanto-traduko de Andrzej Pettyn. Pasintjare en la zagreba festivalo partoprenis alia pola teatro "Banialuka" el Bielsko, kiu prezentis la teatraĵon de Gustaw Morcinek "La forĝisto" ankaŭ en la traduko de Andrzej Pettyn. Por la festivalo en 1978 A. Pettyn preparas nun la tradukon de "Princo Maĉjo la I-a" de Janusz Korczak kun plaĉaj porinfanaj kanzonoj.

## Reagoj - Opinioj

### Pri la Internaciaj Fervojistaj Skisemajnoj

Mi ne scias, el kiu fonto vi ricevis la informon, sed en Pilo-Press N-ro 10/77 enŝteliĝis eraro rilate la sinsekvon de la Internaciaj Fervojistaj Skisemajnoj. Fakte okazos la 19-a en Grainau (Haus Hammersbach) apud Garmisch-Partenkirchen en la semajno de 11. - 18. de februaro 1978, la 20-a en la jaro 1979 estos en Plan Val de Gardena, Italio, kaj la 21-a en 1980 en "Maria Alm", Aŭstrio. La preparoj por 1978 jam komenciĝis kaj ankaŭ por 1979 la italaj kolegoj jam havas la kontrakton kun la koncerna skidomo.

Elfriede Kruse, ĝenerala sekretariino de IFEF

\*\*\*\*\*

## Esperanto en Radio

Bertil Englund, Hof, informas, ke la 16-an de marto, je la 14,05 - 14,10 horo, Deutschlandfunk, Köln en sia ĉiutaga programero "Nachrichten aus Kultur und Wissenschaft" (Informoj el kulturo kaj scienco) informis i.a. pri jena afero: La "Tri-groŝa romano" de Berthold Brecht (Drei-Groschen-Roman) estos eldonata en Esperanto ĉe Edition Leipzig, GDR. Post la pli frue eldonita verko "Nackt unter Wölfen" (Nuda inter lupoj) de Bruno Apitz, tiu verko de B. Brecht estas la dua literatura verko tradukita Esperanten en GDR. - Bertil Englund aldonis, ke la parolisto diris la librotitolon perfekte en Esperanto kaj ankaŭ menciis la tradukinton, d-ron Karl Schulze.

Svisa Kurtonda Radio. D-ro A. Baur faris la 21.3.76 la duan prelegon de sia nova serio pri eklezioj en Svislando. La titolo estis: La katalika strukturo.

ORF Vieno. La mallongonda programo de Vieno denove estis ricevebla kaj bone komprenebla. Post la semajna komentario de d-ro Alfred Macher sekvis resumo de intervjuo, dum kiu kanceliero Bruno Kreisky respondis al demandoj de d-ro Peter Dusek, Radio Vieno, pro la aŭstriaĵ studcentroj fondotaj en du usonaj universitatoj.

Pola Radio. En la Esperanto-Ekspresso de la 20/21.3.77 oni povis aŭdi la rubrikon "Novaĵoj de Pilo-Press" kaj en la antaŭa leterkesto estis cititaj reagoj pri la propono eldoni internacian radio-revuon el PP 10. El la politikaj komentarioj ni citu du, kiuj tuŝas mondajn problemojn kaj kiujn taksu devas ĉiu unuopa aŭskultanto mem: "Internacia tago de batalo kontraŭ rasa diskriminacio" (21.3.76) kaj "Nodaj problemoj de la monda situacio en parolado de Leonid Breŝnev".